Wieliczka, Aŭstrujo. Salminejo	13 Aŭg. 1912	
Li, n-ro 224-226, Aŭg.-Sep.-Okt. 1912, p. 344; Ob, 23; Mem, 20; Gra, 369		
Krakovo, Aŭstrujo. Nova teatro	14 Aŭg. 1912	
Li, n-ro 224-226, Aug.-Sep.-Okt. 1912, p. 355		
Zakopane, Aŭstrujo	18 Aŭg. 1912	
Mem, 20		
Morskie Oko. Aŭstrujo	19 Aŭg. 1912	
Mem, 20		
Bad Neuenahr, Germanujo. Hotelo Weinstock, poste Villa Erna	18 Jul.-22 Aŭg. 1913	
OV, 544; Let, 339; Mem, 20; Gra, 371, 373		
Paris, Francujo. Z vizitas Centran Officejon en 51 rue de Clichy	15 Aŭg. 1913	
Mem, 20		
Montrouge, Francujo. Z parolas ĉe entombigo de C. Bourlet	16 Aŭg. 1913	
OV, 412; Mem, 20; Gra, 126		
Bern, Svisujo. Stacidomo	23 Aŭg. 1913	
Ob, 23; Bru, 112; EE, 48; Mem, 20		
Bern, Svisujo. Domo apud Schänzlihalde	23-31 Aŭg. 1913	
Mem, 20; Gra, 375		
Bern, Svisujo. Kazino	25 Aŭg. 1913	
Li, n-ro 237-239, Sep.-Okt.-Nov. 1913, p. 352; Gra, 376		
Bern, Svisujo. Universitato	26 Aŭg. 1913	
Li, n-ro 237-239, Sep.-Okt.-Nov. 1913, p. 374; Gra, 375		
Bern, Svisujo. Teatro	27 Aŭg. 1913	
Li, n-ro 237-239, Sep.-Okt.-Nov. 1913, p. 380		
Bern, Svisujo. Ekskurso al Thun, Interlaken	28 Aŭg. 1913	
Li, n-ro 237-239, Sep.-Okt.-Nov. 1913, p. 389		
Köln, Germanujo. Stacidomo	1 Aŭg. 1914	
EE, 291; Pri, 119; Mem, 20		
Berlin, Germanujo	Aŭg. 1914	
Mem, 20		
Sassnitz, Germanujo. Stacidomo	Aŭg. 1914	
Mem, 20		
Ystad, Svedujo. Stacidomo	Aŭg. 1914	
Mem, 20		
Stockholm, Svedujo. Stacidomo	Aŭg. 1914	
Mem, 20		
- - - , Finnlando	Aŭg. 1914	
OV, 578; Mem, 21		
Varsovio, Rusujo	Inter 15 kaj 17 Aŭg. 1914	
Mem, 21		
Varsovio, Rusujo. Strato Królewska 41	Jul. 1915-14 Apr. 1917	
OV, 473; Pri, 125; Mem, 21; Gra, 379		

Krakovo, Aŭstrujo. Sinagogo. Z ĉeestis en la sinagogo.	15. Aŭg. 1912
En letero de 5-a de Oktobro 1952 S-ro Salzmann skribis al S-ro Jossinet:	
"Mi ne ĉeestis la Krakovan Kongreson (1912), sed miaj amikoj, kiuj vizitis ĝin (ili ĉiuj estis gasmortigitaj dum la lasta milito), tiam rakontis al mi, ke Zamenhof, dum sia ĉeesto en la Krakova Sinagogo, estis honorvokita al la "Tora", kaj donacis monon por la sinagogo, por malriĉaj malsanuloj kaj por la hebrea maljunulejo."	
(La nica literatura revuo. Majo-Junio 1960, p. 166).	
Bern, Svisujo. Sinagogo. Z ĉeestis en la sinagogo.	Aŭg. 1913
Ĉe la Kongreso en Bern D-ro Olsvanger aranĝis, ke <u>sabate</u> okazu preĝado en la Berna sinagogo. Li insistis, ke Zamenhof ĝin partoprenu. Tiu unue rifuzis, por ne demonstri sian religi-apartenon, supozinte, ke tio ĉi povas iel malutili al Esperanto, ĉu pro ebla malŝato al judoj (kiu povus influi al la ne Esperantista publiko); ĉu pro la postulo de nacia kaj religia senpartieco de li propagandita. Sed Olsvanger argumentis, ke tiel aŭ alie, la Majstro ne sukcesos (eĉ ne demonstrante sian nacian apartecon) depreni de la malŝatantoj de la judoj ilian sintenon al Esperanto, se ĝi estas anticipe negativa. De alia flanko, demonstri prireligian indiferentecon ankaŭ estas malkonvene al la aŭtoro de "Preĝo sub la verda standardo".	
Zamenhof ja aperis en la sinagogo. Alestis judoj kaj ne judoj. Olsvanger "sidigis lin sur la honoran sidlokon, ĉe la orientdirekta preĝejmuŝo, kaj donis al li silkan blankan preĝtukon kun bluj strioj, per kiu la Majstro sin envolvis. Dum laŭtleĝo de la Biblio li estis honorita per alvoko al la ambono, de kiu li aŭdigis la konvenajn berdirojn de "Maftir". Sed la kulmina surprizo estis la rabena prediko, farita en Esperanto." Estis Olsvanger, kiu instruis al la rabeno la lingvon, kaj helpis al li verki la predikon, bazitan sur Cefanja 3/9: "Tiam mi redonos al la popoloj lingvon puran."	
Tute mutis la tiamaj Esperantaj gazetoj, kaj ankoraŭ ĝis nun ne aperis raporto pri tiu signiga evento.	
Al popoloj mi redonos	
Lingvon, kiu pure sonos,	
Por ke unu sola horo	
Voku al la Disinĵoro.	
(The Australian Esperantist", Sep.-Okt. 1961, p. 149).	
Mia rimarko. En la "Lingvo Internacia", n-ro 237-239, Sep.-Okt.-Nov. 1913, sur p. 349 mi rovis, ke tri diservoj: hebrea, protestanta kaj katolika okazis <u>dimanĉe</u> , la 24-an de aŭgusto 1913. En la sinagogo predikis rabeno Saphra meze de profunda silento. A. H.	

Adolf Holzhaus 1976.



AFORISMOJ

Ol la vortoj parolas pli laŭte la faroj.

Ne ekzistas malgrandaj roloj- estas nur malgrandaj aktoj. (Stanisławski).

Kia estas la diferenco inter saĝulo kaj ruzulo? - La dua sukcesas eliri komplikaĵojn, en kiujn la unua entute ne enirus.

La greka filozofa Aristo diris: "Mi amas Platon, sed mi pli amas la veron".

Ne ekzistas senesperaj situacioj, - estas nur senesperigintaj homoj.

Ne la pezo de la jaroj gravas, sed nur la maniero laŭ kiu oni ĝin portas.

Ne maljuniĝas viro, ĝis liakore ne anstataŭis la revojn la pento kaj ĉagreno. (Meri Presler).

Per armilo farita el materio ne eblas venki en spiritaj militoj.

Ĉiu ŝipo veturanta hodiaŭ Amerikon- danku al Kolumbo.

Observas ĝibulo la mondon tra sia ĝibo.

Ne timiĝas fortikaj arboj pro ventaj fajfegoj; ili nur kurbiĝas.

DANK' AL ESPERANTO

(Je memoro de A. Geršater)

Mi ekkonis lin post la milito en la urbo Vilno. Liajn plej proksimajn la faŝistoj murdis. Li mem saviĝis dank' al esperanto. Li estis aktiva esperantisto en la loka klubo. En ĝi li ekkonis iun litovan profesoron de la universitato.

Dum t.n. "akcio"-s-ano G. sukcesis saviĝi kaj nokte forlasis la getton kaj alvenis al la profesoro. Tiu ne estis tro kontenta de tiu vizito, sed ne perfidis s-anon G. Li prizorgis por li falsajn dokumentojn de la litova nomo Gjivalteviski kaj tia-maniere Geršater travivis la hitleran okupacion.

Li estis kuraĝa honorinda persono kaj mia bona amiko. Estu ĉi tiu rakonto anstataŭ kondolenco je memoro de Akiva Geršater.

J. Levin

POEMO PRI MIA PATRINO

Nun mi ne plu iluziĝas - kvankam kredi mi provos, ke en la mortinta urbo mi Vin, Patrino, retrovos.

Ke, el ruin* leviĝinte, el fum' de l' flagranta domo, enbrakos vi mian kolon kaj ekflustros la nomon.

Kaj via magra brusto la plej simplajn vortojn eligos: "Kiel mizeras fil' mia! Per kio mi vin gastigos?"

En viaj mortaj okuloj de l' viv' ekbrulos flamo, per larmoj lavos vi piedojn venintajn el iamo.

Pardonu al mi, Patrino, ke noktas mi nun sen dormo, por via morto petante naturan, facilan formon,

kaj kor' nekorektebla revigas infanan fidendon, ke krimaj fingroj ne tuŝis de viaj haroj arĝenton

ke via kapo ripozis pace en lita mortombro, ke vian korpon ekŝparis senfina frateca tombo...

Kaj kvankam ĉi iluzion nur la despero elveis, eternos via animo, kiu neniam pereis.

Do kvankam sen iluzioj, dubi neniam mi povos, ke en la mortinta domo mi vin, Patrino, retrovos.

Ke vi leviĝos el mortaj ruinoj, el l' urb' fajrofuma, kaj tiam mi vin postsekvos - kreskanta ombro postsuna...

IGNACY SAFRIN

el la pola tradukiŝ
JULIUS BALBIN



UNUTAGA KOKIDO - 72 DOLAROJN

Israelo eksportis aviadile 1000 unutagajn kokidojn al la Suda Koreo por 72000 dolaroj. La alta prezo de la kokidoj estis pagata de Koreanoj ne por ilin tuj manĝi. Ili estas senditaj por bredi novan rason de kokidoj produktitaj en la Scienca Genetika Instituto por Agrikulturo.

La eksporto de tiu branĉo donis al Israelo 3.5 milionojn da dolaroj en 1975, kaj ĉi jare jam duoble-7 milionojn. La kresko de tiu branĉo de eksporto karakterizas la israelan ekonomion, kiu malriĉa en la krudaĵoj devas eksporti "varojn", kiuj ne bezonas krudaĵojn sed multe da cerba laboro.

J. Kohen-Cedek
RENKONTIĜOJ DUM ESPERANTAJ KONGRESOJ



Tre kara amikinjo! (eksterlandano)

Mi deziras raporti al Vi pri miaj greklandaj impresoj. La unua kongreso, kiun mi ĉifoje partoprenis, estis tiu de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo en Tesaloniko. Ĉar fakte mi estas junulo, almenaŭ kvarobla... Tie mi interkonatiĝis kun multaj junuloj kaj junulinoj el plej diversaj landoj. Mi ne povas forgesi la belecon de certa blondulino, tre svelta, kun klasikaj vizaĉtraĵoj. Mi ne povis min deteni kaj demandis ŝin: "En kiu lando ekzistas tiu homgardeno, kie kreskas tiaj belaj virin-floroj?" Kaj ŝi respondis: "Germanio!". Mian fervoron malvarmigis ŝia edzo, kiu konstante gardis ŝin. La Polinoj ne estis belaj, tamen fakte ili estis la plej agrablaj. Ne vane diris Mikieviĉ: "Super ĉiuj virinoj, plej amindaj - Polinoj!"

Gajaj kiel junaj katetoj;
 Blanka, roza la vango, kvazaŭ lakto kaj sango,
 La okuloj - brilantaj steletoj..."

(Traduko de Grabovski).

Jes, la Polinoj multfoje superis la germaninon laŭ tre alta inteligenteco. Tiajn bonepinojn mi estus dezirinta havi por miaj nepoj.

Plaĉis al mi Walter Z. el Rzeszów (Polio). Laŭ liaj nigraj kaj krispaj haroj, laŭ la melankolia brilo de la brunaj okuloj, mi tuj divenis, ke li estas juddevena. Kiam li tion kofesis, li aldonis: "Sed mi sentas min Polo!" Pri judaj aferoj li sciis tre malmulte, sed li interesiĝis.

... La israelaj gejunuloj aperis kun kantado de hebreaj kantoj en esperanta lingvo (de mi tradukitaj), dum mi akompanis ilin per piano. Ili ĉiuj aperis en blu-blankaj ĉapetoj de mia lando kaj faris bonan impreson. Mi mem deklame aŭdigis 3 versaĵojn: unu mian propran ("Rendevuo") kaj du tradukitajn el la mezepokaj aŭtoroj; sufiĉe gajkarakterajn versojn.

Fakte unu israellanda junulo, Amri Vandel, ludis gravan rolon en la kongres-organizo; li tre sukcese prelegis pri komputeroj.

Dum unu vespero alpaŝis al mi certa Italo kaj diris, ke li alportis por mi diplomon pri laŭda mencio pro mia poemo "David kaj Bat-Ŝeba", prezentita al la literatura konkurso "Larius". La diplomon akompanis belega bronza medalo kaj belega ŝlosiltenilo, sur kies dorsoj estis engravuritaj: "Literatura konkurso LARIUS, Como, Italio".

Vendredvespere Israelanoj iris sinagogon akcepti la "Sabatorincinon". Mi estis honorigita per tralego de kelkaj ĉapitroj el la Plejalta Kanto kaj de "Kadiŝ" preĝo.

Dum la UEA-kongreso en Ateno mi renkontiĝis kun multaj iamaj konatuloj. Inter ili kun la bela redaktoro de "Heroldo", la s-ino Ada Fighiera-Sikorska, kun eminentuloj de la movado: d-ro Lins, Setäla, d-ro Borman, Waringhien k.m.a. Mi konatiĝis kun nia prezidanto prof. H. Tonkin.

Tre interesa renkontiĝo estis kun ruĝfeza Tadros Megalli, nun germanlanda Egiptano. Li min tuj rekonis, malgraŭ tio, ke li laste gastis ĉe mi en j. 1935. Unu fojon li multe helpis al mi. Kiam mi parolis kun oficistino de studenta hejmo. Ŝi parolis greke, hispane, itale kaj lame angle kaj balbute france. Angle kaj france - same kiel mi... ni ne povis interkompreniĝi. Kiam alpaŝis al ni fezkovrita Megalli, ŝi alparolis lin a r a b e, petinte lin servi, kiel interpretisto. Li bone plenumis la taskon. Kiam li foriris ŝi rigardante mian pasporton alparolis min lame hebree:

-Kiel vi estas amiko de Arabo?

Mi klarigis al ŝi la rolon de Esperanto.

Ŝi rakontis, ke ŝi naskiĝis en Grekio. Ŝi vivis en Egiptio 12 jarojn kaj poste estis de tie elpelita kun ceteraj Grekoj laŭ ordono de Nasser. Ŝi estis Judino!


En Ateno mi instruis mialandan konsulon saluti la Kongreson je la nomo de nia ŝtato esperantlingve. Li faris tion ne ĝuste akcentante la vortojn. Bruaj ovacioj aŭdiĝis, kiam prez. Tonkin laŭtlegis saluttelegramon de mia ŝtato-prezidento, prof. Kacir. Ankaŭ mia suriro estradon por saluti je la nomo de ELI estis akompanata per bruaj aplaŭdoj. Sed mi min ne flattrompas, ke la aplaŭdoj rilatis al mia persono. La herosaĵoj de miaj patrianoj en la lando de Idi Amin ankoraŭ estis freŝaj en la memoro de la eŭropa publiko.




MAKSIMO

Vivu nur kuraĝe plu,
 Ne demandu time "ĉu?"
 Fine vi prosperos!
 Agu, kiel diktas koro,
 Plendu je nenia horo,
 Ĝojo jen aperos!

Herbert Hammer



PRI LA ISRAELA AGRIKULTURO

La nuntempa mondo paŝas en la direkton de malsato. Por eviti tutmondan malsatkatastrofon, kiu rezultos de la rapida plimultiĝo de la populacio, la agrikultura produktado devas kreski je almenaŭ 3.5% jare. Kaj jen malgraŭ la multaj klopodoj kaj la monaj investoj, nia mondo ne sukcesas pligrandigi la terkulturan produktadon je pli ol 1.7%.

En Israelo tiu ĉi jara kreskprocento atingis 7%, do kvaroble la mezan mondan agrikulturan kresknivelon. Nia lando liveras ĉ. 80% de siaj nutraĵbezonoj. Konsiderante la ŝtonajn grundojn, senpluvan someron, mankon de akvofontoj - la menciitaj ciferoj indikas grandegan atingiĝon. Granda parto de la landa tero ŝajnis antaŭe esti nekulturebla. Oni transformis ĝin en fruktodonan grundon per uzo de diversaj rimedoj, kiel ŝtonforigo, irigacio, aldono de mineralaj sterkoj abunde k.a.

Hodiaŭ loĝantoj de eŭropaj landoj povas ĝui la bonguston de diversaj israelaj agrikulturaj eksportaĵoj, kiel legomoj, fruktoj, konfitaĵoj k.t.p.

Lasta-tempe kreskas ĉiujare eksporto de floroj. En la lastaj monatoj evidentiĝis konvene establi specialan fluglinion por eksportado de freŝaj produktoj kaj floroj al Eŭropo dum la monatoj, kiam ili mankas pro la malvarmo tie. Speciale la regiono de la Morta Maro pro sia troa varmeco donas en monato Februaro fruktojn, kiuj ŝajnas eĉ en Israelo ne esti atingeblaj.

Espereble ankaŭ en la norda Islando dum la kongreso ni povos ĝui la bonguston de israelaj fruktoj.

J. Šemer

LA PROBLEMO DE LA AKVO EN ISRAELO

La problemo de la akvo akriĝas ĉiutage en la tuta mondo, sed nenie ĝi atingis tiel grandan amplekson, kiel en Israelo. Ni scias, ke Nov-Jorko dum la varmaj monatoj suferas pro la manko de akvo, sed samtempe USONO havas la plej grandajn lagojn de la dolĉa akvo de sia nordo. Do ĝia problemo estas nur la transporto t.s. akvotuboj. Akvotubo estas nur problemo de mono kaj laboro. En Israelo la problemo estas pli serioza. Ĉe ni la akvo simple mankas. Niaj kalkuloj montris, ke ni eluzas 90% de atingebla akvo. Niaj riveroj jam ne fluas, ĉar la fluanta akvo estas jam en la akvotuboj. Nia plej granda akvo-rezervujo - la Tiberia Lago - liveras al ni 300 milionojn da kubaj metroj da akvo. Ni ne plu povas ĉerpi, se ni ne volas nenigi la la-

ĝon. Aliaj pli malgrandaj artaj lagoj faritaj de riveretoj, kiuj havas akvon nur dum la malgranda pluva sezono en la vintro malmulte aldonas, ĉar en nia klimato dum la somero la akvo elvaporiga tre rapide kaj aldone danĝerigas la ĉirkaŭaĵon, ĉar ili fariĝas kovujoj por la kuloj kaj aliaj danĝeraj insektoj.

La ĉefa rezervujo por ni estas la subtera akvo. La subtera akvo estas mezurita kaj ni povas precize kalkuli, ĝis kiu kvantoni povas ĉerpi de ĝi la akvon, se ni ne volas, ke la sala akvo de la maro ne saligu la restaĵon de la dolĉa akvo. En tiu direkto ni uzas interesan rimedon. Ni konstruas digojn por halti la fluon de la vintraj torrentoj kaj ne kolektas la akvon surtere, sed tuj enpumpas la akvon per la putoj subteren. Ĝi riĉigas nian akvorezervon subtere kaj la akvo ne vaporiga kaj ne kaŭzas malsanojn.

De alia flanko ni devas malgrandigi la eluzon de la akvo kaj uzon de la purigita uzita akvo. Eluzi la purigitan akvon ne estas facile, ĉar ĝi postulas grandajn supraĵojn da tero, sur kiuj oni povas purigi la akvon, kaj la supraĵo ĉe la urboj ne estas libera. Ni sukcesis eluzi por tiu celo mallarĝan sablan strion de la sabla tero ĉe la maro.

La plej granda kvanto de la akvo estas uzata en la terkulturado. Ĝi estas la ĉefa obstaklo por evoluigi agrikulturon, ĉar ni scipovas eluzi eĉ la dezertajn kaj ŝtonajn kampojn por tiu celo, se ne mankos la akvo... Do en la lasta tempo ni ĉesis uzon de akvo en parto de la libera kampo kaj nun evoluigas la terkulturon en plantvarmejoj, kie ni ne nur malgrandigas vaporigon sed ankaŭ altigas la temperaturon kaj tiamaniere tre abunde pligrandigas la rikolton.

La sensaligo de la akvo estas uzata ĉe ni nur ĉe la Ruĝa Maro en la urbeto Ejlat, ĉar ni ne povas tien liveri la akvon de la Nordo. Intertempe la sensaligo de la akvo estas tro multekosta por ĝin uzi por la agrikulturo kaj industrio.

Oni produktas tie la dolĉan akvon por la homa uzo. Tiamaniere ni scipovis disvolvi turismon en tiu senakva regiono.

La estonteco de la dolĉa akvo tamen estos bazita nur je desaligo, ĉar ĝis nun ne ekzistas aliaj fontoj de akvo, kiujn ni povus eluzi por pligrandiĝanta ĉiutage industrio kaj agrikulturo. La desaligo tamen dependas de la malmulte-kostaj fontoj de energio. Oni nun pripensas kunigi la atomajn elektrajn produktaĵojn kun desaligo, ĉar en tiuj produktaĵoj granda kvanto da energio perdiĝas per malvarmigado de la atoma reaktoro. Tiu energio povas esti uzata en estonteco por desaligi akvon.

H. Mašler

En la biblio, libro Genezo, ĉ.21, ni legas: "Tial tiu loko havas la nomon Beer - Ŝeba, ĉar tie ili (Abraham kaj Abimeleĥ) ambaŭ ĵuris... kaj Abraham plantis tamariskon en Beer Ŝeba kaj preĝis tie al la Eternulo."

En la sama loko, kie la praavo de la Hebreoj starigis interligon kun Abimeleĥ, la reĝo de Gerar, staras hodiaŭ Beer - Ŝeba, la ĉefurbo de Negev, la suda parto de Israelo.

Beer-Ŝeba (hebree: Beer-Ŝeva) estas tre antikva urbo. Ĉe la bordoj de la rivero Beer-Ŝeva oni elfosis postrestaĵojn de loĝloko de la 4-a jarmilo a.K.. Oni eltrovis, ke la tieaj praloĝantoj vivis en subteraj loĝejoj, kunligitaj per tuneloj. La arkeologoj malkovris tie multajn laborilojn, fornojn, fandkaj muldinstalaĵojn, kiuj indikas pri la teknika kapablo de la praloĝantaro.

La historia urbo B.Ŝ. situis sur monteto leviĝanta distance de 4 km de la nuntempa urbo. Tie oni eltrovis fajencaĵojn de la biblia epoko. La urbo estas menciita multfoje en la Biblio, eble pro ĝia centra situo. En ĉiuj epokoj ĝi servis, kiel grava stacio por la karavanoj de la vojaĝantoj al Egiptio kaj por tiuj, kiuj pasis de Eĵlat al la Mediteraneo. Grava estis B.Ŝ. ĉefe dum la romia regado. Post la araba konkero la urbo estis detruata. Turkoj ĝin denove rekonstruis. Ili transformis la lokon en centron de la Negev-distrikto, konstruis tien fervojon kaj uzis ĝin kiel armean elirbazon dum la unua mondmilito. Post la brita konkero B.Ŝ. servis kiel komerca centro por la vagantaj triboj de Beduenoj. Fakte ĝi estis tiam nur malgranda araba urbeto (4000 loĝantoj) kun multaj butikoj. En 1947, dum la sendependiga milito la egipta armeo atakis la distrikton. Post la liberiĝo de la regiono fare de la israela armeo oni komencis reloĝigi la urbon.

Multaj judaj enmigrintoj ekloĝis en la novantikva urbo. La loko iĝis ree administra kaj komerca centro, sed aldone oni establis tie ankaŭ industrian, sciencajn kaj kulturan centron.

Menciindaj estas la Ben Gurion Universitato, la scienca Instituto por Esploro de Negev, la loka muzeo, la regiona hospitalo.

La hodiaŭa urbo konsistas plejparte el novaj loĝkvartaloj por senĉese enfluantaj novemigrantoj. Turistoj ŝatas viziti beduenan merkaton por marĉandi tie pri fajencaj suveniraj kruĉoj aŭ plektitaj buntfibraj matoj. Min allogas ĉefe la aspekto de la urbaj verdaĵoj, kiuj kontrastas kun la ĉirkaŭantaj la urbon dunoj.

Josef Šemer

La Araboj asertas, ke la Kripto de la Patriarkoj estas sankta loko por la Islamanoj, ĉar Iŝmael estis filo de la patriarko Abraham. En la Biblio ni legas, ke en la Kripto kuŝas Abraham kaj Sara, Isaak kaj Rebeka, Jakobo kaj Léa, sekve, praavoj de la juda popolo. En Genezo, ĉapitro 23, ni legas, ke Abraham aĉetis kampon de Efron pagante 400 siklojn de argento. La tero kaj la kaverno devis servi por la tombo. Post la pago, Abraham enterigis sian edzinon Sara.

Estas interese ekkoni iom da historio de la Kripto de la Patriarkoj.


Antaŭ 1500 jaroj, dum la regado de la imperiestro Justinian, oni konstruis bazilikon ĝuste sur la Kripto. Kroniko de la jaro 560 rakontas, ke la korto de la baziliko estis dividita en du partojn: por Kristanoj kaj Judoj. Dum la kruckavalira regado oni transformis la bazilikon en preĝejon. En tiu periodo estis malpermesite por la Judoj preĝi en la Kripto. Post la forpelo de Kruckavaliroj, la Islamanoj transformis la preĝejon en moskeon. Dum la turka regado same estis malpermesite al la Judoj viziti la Kripton. Sed dum la angla mandato estis permesite al la Judoj supreniri sep ŝtupojn, kiuj kondukas al la loko, en kiu opozas la patriarkaj paroj.

Hebron troviĝas sur la altaĵo. En la mezo de la urbo troviĝas impona kaj bela konstruaĵo. Ĝi estas la Kripto de la Patriarkoj. Oni eniras sur larĝaj ŝtupoj. La vizitantoj devas esti dece vestitaj. Ĉie regas pureco kaj trankvilo. La planko estas kovrita per tapiŝoj. En ĉiuj ejoj la luno estas obskura, same kiel en la pariza katedralo Notre Dame. La tomboj estas ĉirkaŭataj de la feraj kradoj. Ĉiu patriarka paro havas apartan ejon arte ornamitan kaj simbonan tombon (la veraj tomboj troviĝas malsupre en la roko).

Dum la jarcentoj Araboj pruvis forviŝi gravajn postsignojn de la juda historio. Kelkcent jarojn post la detruo de la dua Templo, Omar konstruis moskeon ĝuste sur la ruinoj de la templo; same ili procedis en Hebron, konstruante tie moskeon.

Nun estas la Kripto atingebla por Judoj kaj Islamanoj, kiuj egalrajte dum diversaj horoj de la tago povas ĝin viziti kaj tie preĝi.

Kamil Perlman



NIA AGADO KAJ MOVADO



K U R S O J

La nombro de la homoj volantaj lerni Esperanton pligrandiĝis. La kurso de d-ro Maŝler en la Junulara Centro en Tel Avivo, kiu ĉiujare altiris 20-25 gelernantojn, ĉi jare havis 70 adeptojn. Ne estis eble ĉiujn koncentrigi en unu kurso. D-ro Maŝler sukcesis ricevi aldonajn du ejojn en la sama domo kaj s-ano J. Murĵan prenis grandan parton da lernantoj kaj komencis instrui ilin en du kursoj; d-ro Maŝler gvidas la trian kurson. La kurso ĝis nun sukcese antaŭenmarŝas kaj espereble en Februaro nia aro notinde pligrandiĝos.

Ankaŭ la koresponda kurso evidente pligrandiĝis kaj s-ano J. Šemer ne scipovis akcepti ĉiujn lernantojn. Ankaŭ li ricevis helpon kaj parton de lernantoj instruas M. Ben Porat, A. Zajdman kaj D. Mager.

Aliajn kursoj gvidas samideanoj Zeevi kaj Alberg en Natanja, s-ano Heimlich en Herclija kaj s-ano Armoni en Hajfo.

EN LA ISRAELA GAZETARO


En tri israelaj gazetoj aperis grandaj intervjuoj kun niaj samideanoj: En la magazino "AT", la intervjuo estis du paĝojn longa kun fotografiaĵo de la esperanto-grupo. Intervjuataj estis d-ro Maŝler kaj liaj gelernantoj.

La dua intervjuo aperis en la junulara revuo "MAARIV LA-NOAR". En ĝi rakontis niaj junaj samideanoj pri siaj kongresaj travivaĵoj.

La tria artikolo aperis en la geknaba revuo "HAREC ŜELANU". Ankaŭ tie estis intervjuataj JELI-anoj.

La Israela ĵurnalo "MAARIV" aperigas senpage sciigojn de korespondpetantoj el eksterlando en ĉiuj lingvoj inkluzive Esperanton.

D O N A C O J



Jaakov Rotenberg (pere de d-ro Maŝler)	60	IL.
Šimon Dagan (pere de d-ro Maŝler)	100	IL.
Jaakov Rotenberg (pere de d-ro Maŝler)	60	IL.
Wunderbaum Dora (por JELI)	100	IL.
Natalia Haberman-Israeli (memore al ŝia filo- Reĥavja)	100	IL.

S C I I G O J

Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, 49150 Baugé, Francio, solenas 25 jaran datrevenon de sia ekesto. Ĝi invitas al siaj kulturaj aranĝoj:
Pasko -3-a - 9-a de Aprilo: praktika pedagogio por kursgviantoj.

3-a de Julio -23 de Julio: internacia ferio. (Prelegoj, distraĵoj, ekskursoj, individuigita kurso).
24-a de Julio- 13-a de Aŭgusto: simila programo kun kursoj por komencantoj kaj supera kurso.
14-a de Aŭgusto-3-a de Septembro: sama programo.

ELI rekomendas al ĉiuj, kiuj finis la kurson por la komen-
cantoj, antaŭol ili partoprenos la kongresojn, ĉeesti iun
de la internaciaj aranĝoj, kie ili povos plibonigi sian kon-
non de Esperanto. Al ili apartenas Kulturdomo en Grésillon
kaj internacia seminario en Helsinjoro (Danlando).

LA TURISTA BROŝURO "ISRAELO 1976"

En "Esperanto" kaj "Heroldo" aperis sciigo, ke ELI
dissendas "Israelon 1976" pro 1 resp. kupono. Sekve de
tiu sciigo ELI ricevis kelkdekojn da petoj pri la bro-
ŝuro. Inter ili estis ne malmultaj de la Orienta Eŭropo.
Bedaŭrinde ne ĉiuj sendaĵoj atingas adresatojn en tiu
parto de Eŭropo.

KOLEKTIVA MENDO DE "JARLIBRO" kaj "ESPERANTO"

ELI rivevis allogan proponon mendi kolektive s.n.
eldonaĵojn. Se ELI sukcesos kolekti 200 mendantojn, Israe-
lo ricevos 60% rabaton, t.s. ke la abono kostos nur 12
guldenojn. Organizati tamen la aferon ne estas eble dum
unu monato. Ni petas niajn samideanojn sciigi nin, ĉu
ili volas aboni per ni s.n. eldonaĵojn laŭ malgrandigita
prezo. Se la ĵurnalo devas esti sendita aerpoŝte, la pre-
zo estos 20 guldenojn por jaro.

NI J GASTOJ

S-ano Naĥum Blonstein	USONO
Prof. d-ro Otto Pancer	Jugoslavio
S-ano David Scholz	Germanio

ESTU BONVENINTAJ

Familio Zalmanoviĉi (tri samideanoj) el Rumanio venis
al Israelo kiel novemigrintoj. S-ano Zalmanoviĉi estis
agema en la rumana movado. Ni povas esperi, ke li an-
kaŭ plifortigos nian ageman anaron.

KLUBAJ VESPEROJ

David Scholz	Lumbildoj de Germanio
E. Haroun	Interparolado (Feriaj travivaĵoj)
A. Manor	Ĉu ekzistas esperanta kulturo?
J. Ben Alter	Juda folkloro
H. Mašler	Estanteco de Esperanto
M. Ben Porat	Filmo pri labortendaro
Naĥum Blonstein	Israelaj kaj palestinaj interrilatoj
A. Ron	Prelego kaj diskuto
A. Wandel	JELianoj rakontas pri sia agado
K. Perlamm	Operoj de Verdi
A. Manor	Kalman Kalocsay
H. Mašler	Kiel fariĝi milionulo

AKTIVAĴOJ DE JELI

La lasta tempo karakteriziĝas per intensaktivado de la junularo kaj per grandaj atingoj en la propaganda kaj informa tereno.

a. La junulara klubo "Krokodilo", kiu jam pasis la naskiĝajn malfacilaĵojn, regule funkcias (ĉiun duan merkredon, je la 8-a vespere, en Bejt Hanoar) kaj invitas ne e-istajn gastojn por vidi kaj konvinkiĝi. DO sendu viajn dubantajn kaj scivolemajn junajn konatulojn...

b. Lastatempe aperis amaso da artikoloj pri e-o en la ĝenerala kaj junulara gazetaro: En Septembro - letero de A. Wandel pri la israela grupo en la e-o kongresoj en Greklando aperis en Maariv, Davar kaj Al Hamišmar. En Oktobro detala intervjuo pri e-a junularo en la junulara revuo Maariv Lanoar kaj en Decembro - simila intervjuo en Haare Selanu. (vidu p.22).

c. En lastmomenta fulmkampanjo JELI multon kontribuis al la nova hebrea e-o vortaro, korektante kaj aldonante ĝuste antaŭ la presigo.

Raportis A. Wandel

NOVAJ SAMIDEANOJ

(finintoj de la koresponda kurso)

Tamar Linkenberg	Tel Aviv
Jehoŝua Sakov	Ramat Efal
Jael Nevo	Kibuc Ejn-Harod Meuĥad
Arie Noj	Hod Hašaron
Itaj Rot	Kibuc Dvir
Pnina Silverman	Kibuc Zikim
Eldad Zalcmán	Bnej Brak

Volas korespondi (daŭrigo).

F-ino N. Niederhauser, Svislando, CH-8590 Romanshorn, Hafenstr. 48. pensiita trafikoficistino, nun lernas Esp.

S-ro Walter Ostermann, D-4720 BECKUM, Werseweg 48, Okc. Germanio. pensiulo, labortempmezuristo, kolektas poŝtmarkojn.

S-ro Oscar Sher, Bronkhorst-str. 75, Groenkloof, Pretoria 181, Suda Afriko.

S-ro Raymond Devendeville, 17 Rue de la Jappe, 59155 Faches-Thumesnil, Francio, volas krei etan klubon de amikoj de Esperanto en kiu ĉiu membro havu leterkontaktojn kun la aliaj membroj.

Grupo de esperantistoj en Okcidenta Germanio. Aĝoj: 26-42 jaraj. Interesiĝas pri historio, arkeologio, maro, kamparo, naturo, moroj kaj kutimoj. Adreso: Richard Schulz, 1502 Babelsberg 2. Otto-Erich-Str. 5. Wset Germany.

Hans Joaĥim Christofer Brendel, 3/119 Kadumba-str. Yeronga-Brisbane QLD. 4104, Aŭstralio. Junulo, kolektas poŝtmarkojn, monerojn, emblemojn, ŝatas naĝi, remi, bicikli.

Bardi Liviu, P.k. 367, R-3400- Napoca, Rumanio. 29-jara vegetarano


Varga Ibolya, 4251 Hajdusamson, Vörös Hadsereg ut. 25, Hajdu Gihar Megye. Hungario. 18-jara komercantino.

L. Herrigers, Miksebaan 13, 2130 Brasscheĥoot, Belgio.



E N H A V O

Jida Poemo de L. Zamenhof (trad. Majmon)	1
Neforgesebla renkontiĝo kun d-ro Zamenhof - Joel Kavenaki (trad. Manor)	2.
Verkoj de L. Zamenhof - A. Holzhaus	3.
Domoj, urboj, en kiuj Zamenhof loĝis, studis - A. Holzhaus	6.
Aforismoj	14.
Dank' al Esperanto (je memoro de A. Geršater)-Levin	14.
Poemo pri mia patrino I. Safrin (trad. Balbiu)	15.
Unutaga kokido - 72 dolarojn	15.
Renkontiĝoj dum esp. Kongresoj-J. Kohen Cedek	16.
Maksimo	17.
<u>Iom pri Israelo</u>	
Pri israela agrikulturo - J. Šemer	18.
La problemo de akvo en Israelo - H. Mašler	18.
<u>Israelaj vidindaĵoj</u>	
Kie Abraham plantis tamariskon - J. Šemer	20.
Kripto de la patriarkoj - K. Perlman	21.
<u>Nia agado kaj movado</u>	
Kursoj	22.
El la israela gazetaro	22.
Donacoj	22.
La turista broŝuro "Israelo 1976"	23.
Klubaj vesperoj	24.
Aktivaĵoj de JELI	24.
Novaj samideanoj	24.
Volas korespondi (internaj kovrilpaĝoj)	



La grafikan parton de
la titolpaĝo pretigis
nova adeptino de nia
lingvo s-ino Rut Anŝel.